*Beletra Almanako*, vol. 8, 2014, n-ro 19, pp. 121–137.

**Ulrich Lins**

# La du flankoj de Ivo Lapenna

*La nomo de Ivo Lapenna ‒ homo, kiu dediĉis preskaŭ sian tutan vivon al la Esperanto-movado ‒ estas tre bone konata inter la esperantistoj. Dum la 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo (1974) la multjara gvidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) deklaris sian eksiĝon. Pri la kialoj de tiu eksiĝo kaj la ĉirkaŭaj cirkonstancoj mi skribis aliloke.*[1] *Tie ĉi mi volas koncentriĝi al la demando, kia estis la persona fono de Ivo Lapenna kaj, precipe, kiamaniere ideoj liaj, akiritaj en la junaĝo en Kroatio, efikis dum lia agado por UEA.*

Lapenna naskiĝis en la apudmara urbo Split, en Dalmatio, do en regiono, kiu estis parto de la multnacia Aŭstria-Hungara Monarkio kaj estis proksima al la influo de Italio. Li apartenis al familio, kiu volonte allasis multnaciecon. Hejme li parolis kun la patro kroate, kun la patrino itale. Unu ĉeftrajto de Lapenna estis lia vasta spektro de interesoj. Li studis juron kaj akiris doktorecon en tiu fako en 1933 – kaj en la sama jaro li ricevis diplomon en muziko.

Tiu vasta interesiĝemo inkluzivis ankaŭ Esperanton. En biografiaj skizoj pri Lapenna kutime estas dirite, ke li eklernis la lingvon en 1928. Sed li mem foje menciis, ke jam antaŭ tio, proksimume kvar jarojn pli frue, li komencis lerneti Esperanton.[2] En marto 1929, ĵus fininte la mezlernejon, li kunfondis en Zagreb Studentan Esperantistan Klubon kaj iĝis ĝia unua prezidanto. Kelkajn monatojn poste li partoprenis Universalan Kongreson (UK), nome la 21-an en Budapeŝto. Tiu sperto komencis forte ligi lin al la lingvo kaj movado. Li poste rakontis, ke la kongreso donis al li „ĝis tiam nekonatan intelektan sensacion“, ĉar tie unuafoje li „sentis la principan egalecon de la homoj super la rasaj, naciaj kaj aliaj diferencoj“[3].

La plej frua esperantlingva produkto el la plumo de Lapenna, kiun mi konas, estas unupaĝa artikolo, per kiu li kontribuis en junio 1932 al studenta bulteno en Zagreb.[4] Lia temo estas la rilato inter Esperanto kaj la t.n. interna ideo. Li levas la demandon, kian utilon la homoj atendas de Esperanto. Maltrankviligas lin la penso, ke de la fortostreĉoj, per kiuj la esperantistoj disvastigas Esperanton, en estonteco profitos personoj, kiuj tion fakte ne meritas. Lapenna skribas:

---

[1] Vd. la ĉapitron „Ivo Lapenna kaj la komunistoj“, en mia libro *Utila estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA*, Rotterdam: UEA, 2008, p. 75–112. – La nuna eseo baziĝas sur prelego, kiun mi faris dum la scienca simpozio “Esperanto kaj kroata kultura identeco” en la Filozofia Fakultato de la Universitato de Zagreb, 8-11-2008.
[2] *Esperanto* 51. 1958, p. 116.
[3] Ivo Lapenna, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, dua eldono, Rotterdam: UEA, 2009, p. 41. – En Budapeŝto estis farita decido fondi Studentan Tutmondan Esperantistan Ligon (STELO); la preparan laboron oni konfidis al la Zagreba Klubo. Dum la 23-a UK en Krakovo (1931) laŭ propono de Lapenna estis decidite, ke ĉiujare unu studenta klubo estu komisiita funkcii kiel centro de ĉiuj studentaj Esperanto-organizaĵoj. La taskon transprenis la Zagreba Klubo kaj fakte plenumis ĝis la militeksplodo.
[4] *Bulteno de „Centro de Studentaj Esperantistaj Organizaĵoj“*, jaro I, 1932, n-ro 2, p. 1. – La artikola titolo “Esperanto” konsistigas la unuan frazon. Kiel aŭtoro estas indikita: “L.I.”

> Ni volas la enkondukon de Esperanto, tio estas vera! Sed ni volas ankaŭ, ke tiu enkonduko *utilu* ne nur al kelkcent da [*sic*] komercistoj, industriistoj, politikistoj k.s. sed a*l la tuta homaro*, aŭ almenaŭ al ĝia plej granda parto.

Konantoj de la historio de Esperanto bone scias, ke tiu esprimo similas eldiron, kiun faris Zamenhof en la Ĝeneva Kongreso (1906). Tie la aŭtoro de Esperanto minacis, ke li kaj la pioniroj, se oni postulos de ili eviti en sia agado ĉion idean, indigne forĵetos la verdan stelon kaj ekkrios kun abomeno: "Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!"

Lapenna esprimas en la Zagreba Bulteno la samon iom pli ĝisdate. Li emfazas, ke "la hodiaŭa socio ne akceptos Esperanton" kaj ke "*ni eĉ tion ne volas*, ĉar ni havas neniajn garantiojn, ke ĝi estos bone uzata". Li konkludas per la jenaj vortoj: "*aŭ Esperanton kun la principoj de la interna ideo, aŭ nenion!*"

Ke la juna Ivo politike tendencis maldekstren, ni povas supozi pro liaj malŝataj vortoj pri la „hodiaŭa socio". Aliaj fontoj konfirmas, ke lia lernado de Esperanto enkadriĝis en la allogo-povon, kiun por multaj samaĝuloj havis la marksismo. Kiel memoras Zlata Flego[5], lerni Esperanton estis modo tiam, paralele al la esperado pri kreiĝo de nova sociordo en Soveta Unio. Maldekstruloj konsideris Esperanton kiel siaĵon. Tion tamen necesis kaŝi, ĉar en tiutempa Jugoslavio la Komunista Partio estis eksterleĝa.

Ni ne scias precize, kiel evoluis la maldekstremo de Lapenna. Ankaŭ li devis esti singarda, ĉar la polico emis konsideri ĉiun intelektulon komunisto. Eble iu esploros, ĉu li jam en la 1930-aj jaroj kaŝe aliĝis al SKOJ, la Junulara Komunista Ligo de Jugoslavio, kiel faris Zlata Flego, Petrana Janus kaj Ivo Borovečki, komunistaj esperantistoj, kiuj en 1938/39 komencis lerni Esperanton. Sed ni ja scias, ke ekde 1934 Lapenna jure praktikumis en la advokatejo de Ante Ramljak, homo, kiu estis konata pro la defendado de komunistoj antaŭ tribunalo.

Kune kun sia jurista laboro Lapenna fervore aktivis por Esperanto. Li prelegis kaj gvidis kursojn, precipe kadre de Akademia Esperantista Klubo (AEK), kiu en novembro 1935 elkreskis el la studenta klubo kaj rapide alprenis tutlandan gravecon, plue kun Lapenna kiel prezidanto kaj senlaca movanto.[6] Kaj AEK estis sukcesa: la kunvenojn vizitis meze pli ol 70 personoj[7]; post „Esperanto-semajno" organizita de ĝi en 1938 entute 680 homoj aliĝis al kursoj.[8] Grave estas konstati, ke la movado ne emfazis akademiecon je la kostoj de pli malaltaj sociaj tavoloj. Tion dokumentas la revuo *La Suda Stelo*, kiu regule havis Laboristan Paĝon. Kiam Lapenna en 1937, sekvante inviton prelegi, veturis al la vilaĝo Virje apud la hungara landlimo, li estis ravita. En *Esperanto Internacia* li tutpaĝe raportis pri tiu vojaĝo.[9] La anoj de la ĵus fondita Esperanto-klubo montriĝis ne nur bone parolantaj Esperanton, sed ankaŭ scivolaj kaj kapablaj klare juĝi. Ekspozicio pri Esperanto, kiun organizis la klubo, montris "la tre altan kulturan nivelon de nia vilaĝanaro kaj ĝian grandan deziron al kleriĝo kaj progreso". Lapenna eksciis, ke ankaŭ en aliaj vilaĝoj de la regiono fondiĝis Esperanto-grupoj – jam ne plu surprize, ĉar, laŭ Lapenna: „Ni troviĝas en unu el la plej kulturaj partoj de

---

5 „(Intervjuo kun) Zlata Flego", *La Gazeto* 16. 2001, n-ro 92, p. 8.

6 Vd. lian propran memor-artikolon pri AEK, „Ekzemplo de modela Esperanto-societo", en: *La Esperanto-societo*, Rotterdam: UEA, 1966, p. 11–17.

7 *La Suda Stelo* 7. 1938, p. 78.

8 Franjo Šlogar, „Rezultoj de nia ‚Esperanto Semajno'", *La Suda Stelo* 7. 1938, p. 81.

9 Ivo Lapenna, „La kroataj vilaĝanoj parolas kaj uzas Esperanton!" *Esperanto Internacia*, 1937, n-ro 15 (decembro), p. 188.

Kroatujo." Admire li fine de 1968 rakontis, ke la kroataj kamparanoj estas dotitaj per natura inteligenteco.

Ni je tiu ĉi punkto konsciigu al ni la historian fonon. Komence de 1933 Hitler akiris potencon en Germanio. La efikon de la ŝanĝita situacio la esperantistoj sentis tuj. Ili troviĝis meze de la preparlaboro por la 25-a UK en Kolonjo somere de 1933; la decidon okazigi ĝin la nazioj pli frue atakis furioze. Ankaŭ ekster Germanio la klimato por Esperanto malboniĝis. En pluraj landoj la esperantistoj sentis sin devigitaj iel reagi je malamikaj tendencoj. Multaj preferis elstarigi la neŭtralecon de la Esperanto-movado, sed aliaj pretis kompromisi aŭ eĉ fari signifajn cedojn. Rudolf Rakuša ekzemple en *La Suda Stelo* de septembro/oktobro 1933 pledis, ke la movado ne plu baziĝu sur la individuo, nek sur (abstrakta) homaro, sed sur tio, kion la aŭtoro konsideris kerno de la nuntempa ideologio: la naciismo.[10]

Evidente, minacis neglekto de la tradiciaj valoroj de la Esperanto-movado. Dum la plej multaj gvidantoj ankoraŭ ŝanceliĝis, Lapenna ekde 1935 energie prenis pozicion en la diskuto pri la demando, kiel la esperantistoj frontu la plifortiĝantajn naziismon kaj faŝismon. Li turnis sin kontraŭ Rakuša kaj Ivo Rotkvić[11] pro ilia troneŭtraleco aŭ cedemo al malamikoj. Baldaŭ, en 1937, li iĝis pli atakema. En la aprila ĉefartikolo de *La Suda Stelo* ni legas: „La malneŭtrala 'neŭtraleco' estas la kancera vundo de la esperantista movado. […] Ĝi mordas kaj ruinigas la societajn organismojn, bremsante ĉiun pli pozitivan laboron." Lapenna forte kritikis esperantistojn, kiuj postulas „esti neŭtralaj en senco malebla, t.e.: nenion pensi kaj nenion opinii, aŭ silenti kaj per silentado ĉion aprobadi!"[12]

En la diskuton pri neŭtraleco Lapenna enkondukas nocion, kiu tiutempe ne estis multe uzata inter la esperantistoj, eble ĉar ankaŭ ĝi sonis tro neneŭtrale: demokrateco. Sur la principojn de demokrateco, klarigas Lapenna, necesas bazi la tutan movadon, ĉar demokrateco "signifas kulturon kaj toleremon" kaj "alportas lumon, klerecon, progreson kaj sukceson". Demokrateco devas akompani la neŭtralecon, por ke ĝi ne iĝu negativa fenomeno – jen anonciĝas flanke de Lapenna rekonsidero pri la ideologia bazo de la Esperanto-movado. Li admonas, ke oni komprenu, ke iuj reĝimoj abomenas la ideon mem de internacia lingvo kaj ke la „esperantistoj estas persekutataj […], ĉar ili en alinacianoj rigardas homojn kaj ne malsuperajn estaĵojn, homojn, kun kiuj ili deziras interŝanĝi la ideojn, kontaktiĝi, amikiĝi kaj kunlabori anstataŭ reciproke detruiĝi".[13] Lapenna akre kritikas tiujn esperantistojn, kiuj „pro la momenta konjunkturo" neas la idearon de Zamenhof „nur por – por savi la aferon".[14] Tio indikas, laŭ li, la bankrotiĝon de la pseŭdoneŭtraleco.

En septembro 1937 Lapenna iĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL). Li nun povis kun pli da aŭtoritato daŭrigi sian kritikon kontraŭ timemuloj kaj sian pledon por ofensivo kontraŭ la malamikoj. Al la legantoj de *La Suda Stelo*, la organo de JEL, li klopodis instrui novan memfidon pri la idea bazo de Esperanto. La instruo estis: ke Esperanto povas sukcesi nur kie floras kulturo kaj progreso; ke la esperantistoj ne povas esti neŭtralaj rilate faŝismon; kaj ke ili helpu krei tiajn kondiĉojn en la mondo, kiuj faciligas kaj garantias la homajn kontaktojn per Esperanto. Kion Lapenna skribis unue precipe por jugoslavia publiko, baldaŭ iĝis konata ankaŭ en aliaj landoj. Fakte, la problemoj, kiujn li tuŝis, koncernis preskaŭ la tutan Eŭropon. En 1938, en la 30-a UK en Londono, Lapenna ricevis okazon prezentiĝi sur

---

10 Rud. Rakuša, „Nova ideologio kaj nova vojo", *La Suda Stelo* 2. 1933, p. 115–116.

11 Ivo Rotkvić, „Por du apartaj tendoj", *la Suda Stelo* 5. 1936, p. 19–20. La reago de Lapenna: „Unueco super ĉio", *La Suda Stelo* 5. 1936, p. 32–33.

12 Ivo Lapenna, „La malneŭtrala ‚neŭtraleco'", *La Suda Stelo* 6. 1937, p. 9–10.

13 Ivo Lapenna, "La danĝero unuigas", *La Suda Stelo* 6. 1937, p. 26.

14 Ivo Lapenna, "La 15-an de decembro", *La Suda Stelo* 7. 1938, p. 89.

internacia scenejo. Salutante en la inaŭguro por Jugoslavio, li mallonge, sed tre efike ripetis la esencon de siaj artikoloj en *La Suda Stelo*. Lapenna entuziasmigis la kongreson per flama pledo por la " interna ideo" kiel bastiono kontraŭ faŝismo. Estis aplaŭdego, Lapenna iĝis populara; dum la UK li estis elektita en la estraron de Internacia Esperanto-Ligo. Oni lin kore bonvenigis post la reveno al Zagreb.

Unu jaron poste eksplodis la Dua Mondmilito. Ĝi ne tuj kaptis Jugoslavion, *La Suda Stelo* ankoraŭ aperis plu. Al ĝia lasta numero, de aprilo 1941, Lapenna kontribuis per ĉefartikolo kun la titolo "La ŝancoj de Esperanto".[15] En ĝi li asertas, ke "la estonta mondo prezentos unu densan reton de ekonomia kaj kultura ligiteco", en kiu tamen la unuopaj popoloj ne perdos sian gravecon. Se estas danĝero pri sennaciigo, ĝi venas de grandaj potencoj, ne de Esperanto, kiu male servu kiel ŝirmilo "kontraŭ la lingvaj atakoj de la reganta(j) nacio(j)".

Nelonge post apero de tiu artikolo germanaj trupoj invadis Zagrebon, Ustaŝo transprenis la povon. Sur la listo de ekzekutotoj troviĝis ankaŭ Lapenna, sed li povis eskapi. Dum la milito pereis aŭ estis mortigita pli ol unu triono de la membroj de Akademia Esperantista Klubo.

Mi ne skizu tie ĉi la historian evoluon en la kvardekaj jaroj. Sufiĉu la atentigo, ke Lapenna aliĝis al la partizana armeo kaj ke dum la milito li klopodis konstrui la bazon por profesia kariero. Tuj post la militfino, liaj perspektivoj ŝajnis esti tre bonaj. Jam en 1946 li iĝis docento en la Jura Fakultato de la Zagreba Universitato, lia fako estis internacia juro. Samjare li ofice partoprenis la Packonferencon en Parizo, kaj en 1947/48 li agis en la Internacia Kortumo en Hago kiel konsilanto en la proceso de Albanio kontraŭ Britio pro incidento en la Markolo de Korfu. En printempo 1948 li estis nomita eksterorda profesoro.[16]

Lapenna povis plenumi tiujn taskojn kaj sukcese avanci, ĉar la reĝimo fidis lin. Eble jam dum la milito, sed certe tuj post ĝi Lapenna iĝis membro de la Komunista Partio, al kiu li, kiel supre aludite, jam antaŭ la milito estis proksima. Li estis konfidato de la nova politika regantaro kaj montris tion ankaŭ al la esperantistoj tre videble. La okazo estis la unua UK postmilita, la kongreso en Bern en 1947. Tie li nome de ok landaj asocioj de UEA, precipe orienteŭropaj, prezentis rezoluci-proponon, laŭ kiu la esperantistoj uzu sian lingvon en la batalo kontraŭ ĉiuspeca faŝismo kaj ankaŭ energie helpu senmaskigi la profitavidajn grupojn, kiuj volas „provoki novan, ankoraŭ pli teruran mondmiliton“[17].

Per lingvaĵo, kiun ni nun nomus stalinisma, Lapenna forte defendis en Bern la aktualan politikon de Soveta Unio kaj la dependaj popoldemokratioj. Li faris tion tiel senkompromise, ke miris ankaŭ liaj simpatiantoj. En la decida voĉdono lia propono estis klare venkita. Sed la memoro pri la agitado de Lapenna ankoraŭ longe postefikis inter la esperantistoj. Li mem faris nenion por forgesigi ĝin, ĉar ĝis sia morto li defendis sian sintenon en Bern, erarige metante ĝin en la kontinuecon de sia dumviva batalo kontraŭ faŝismo (kaj citante la rezoluci-proponon ne plene).

Eble bonŝance por Lapenna, minimume por lia esperantista kariero, Tito ekkonfliktis kun Stalin en la unua duono de 1948. La kunlaboron kun aliaj balkanlandaj Esperanto-asocioj, kiu fakte por UEA estis minaca, Lapenna devis ĉesigi sub la premo de la cirkonstancoj. En la 33-a UK en Malmö en 1948, unu jaron post Bern, Lapenna jam kondutis tute modere, eĉ tre kviete. Ankaŭ tial li povis pli kaj pli influi la agadon de UEA, kiu dankas al li adapton de la statuto al

[15] I. Lapenna, „La ŝancoj de Esperanto“, *La Suda Stelo* 10. 1941, p. 30.

[16] Por la aserto, ke Lapenna en 1948 iĝis membro-korespondanto de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj en Zagreb, ne estas trovita konfirmo.

[17] Por detaloj vd. *Utila Estas Aliĝo*, p. 81–84.

la nuntempo, inkluzive la ligadon de la asociaj principoj al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Fine de 1949 Lapenna forlasis Jugoslavion. Ke li neniam plu revenos, neniu povis antaŭvidi tiam. Komence ŝajnis, ke li iris al Francio nur por fari poststudajn esplorojn. Sed dum la jaro 1950 oni iom post iom komprenis, ke li ne intencas reveni. Pri siaj motivoj li mem uzis neunuecajn klarigojn. Al amikoj li diris, ke li ne eltenas la penson, ke denove estos milito – li ŝajnis timi la invadon de sovetiaj trupoj en Jugoslavion. Pli rekta, tiutempe ne konfesita motivo tamen estis malkontento pro la ĝenerala politika-socia situacio en Jugoslavio kaj maltrankviliĝo pro la kontraŭdiroj inter la teorio kaj praktiko de komunismo. Rolon ludis tre verŝajne ankaŭ lia timo, ke la plenumo de la postulaj taskoj de profesoro inkluzive la submetiĝon al partia disciplino ne estos daŭre akordigebla kun la deziro aktivadi por Esperanto.

Lapenna pene konstruis por si profesian karieron ekster sia hejmlando. Li ne longe restadis en Francio, ekde la mezo de 1951 li loĝis apud Londono. Inter okcidentaj fakuloj li komencis akiri renomon per franclingva verko, kiu, aperinte nelonge post la morto de Stalin, disponigis aktualan scion pri la sovetia kompreno de internacia juro.[18] Poste liaj sciencaj verkoj aperis unuavice en la angla lingvo. La establiĝon en okcidento dum la unuaj dek jaroj konsiderinde ĝenis la jugoslavia fono de Lapenna – lia pasinteco kiel partizano kaj kiel ideologia protagonisto de nova, "progresema" Esperanto-movado. En 1954 lia svisa estrara kolego Hans Jakob suspekteme notis sian observon, ke Lapenna neniam diris, ke li iam estis komunisto, ankaŭ ne, ke li rompis kun komunismo-leninismo.[19] Plej malagrable, en Usono kelkaj esperantistoj sub la influo de la makartiismo, do de antikomunisma histerio, esprimis kontraŭ Lapenna la suspekton, ke li volas konduki la movadon en la tendaron de la komunistoj. Lapenna laŭ sia maniero ne simple klopodis defendi sin kontraŭ tiu ĉi absurda kulpigo, sed tondre rebatis. Li zorgis, ke la usonaj esperantistaj makartiistoj estu eksigitaj el UEA.

Ekde la dua duono de la kvindekaj jaroj Lapenna estis la gvida persono en UEA. En 1955 li iĝis ĝenerala sekretario, en 1964 prezidanto de UEA. Li helpis levi la internacian prestiĝon de Esperanto per sia insistado en Montevideo fine de 1954, ke Unesko rekonu la popolinterligajn kaj pacigajn atingojn de la Esperanto-movado. Tio multe utilis al UEA en ĝiaj publikaj rilatoj, cetere ankaŭ por prepari la vojon por la restarigo de movado en Soveta Unio post preskaŭ dudekjara silentado.

Paralele al tiu agado eksteren, Lapenna ĉiam donis grandan atenton al la interna fortikigo de la asocio kaj al la kreo de pli serioza bildo de la esperantistoj. Tion li jam tre klare montris antaŭ la milito – dum la 31-a UK, kiu okazis, same en Bern, tuj antaŭ la militeksplodo. En sia raporto pri la kongreso li jene „recenzis" unu muzikan programeron:

> Bedaŭrinde la prezentado ne estis altnivela. La orkestro estis absolute tro malforta. La kantado de la ĥoroj kaj muzikado kelkloke tre ĝenis pro falseco. Ŝajnas, ke ankaŭ la dancoj ne estis atente ekzercitaj. Kelkaj kostumoj de la aktoroj iom tro eluziĝis kaj kelkloke iliaj partoj ne estis en stilo kun la tuto. Ekz. la reĝo estis vestita en antikva ruĝa mantelo kun la krono sur la kapo, sed li havis tute modernajn akrepintajn ŝuojn![20]

Oni povus sin demandi, ĉu Lapenna ne estis iom aŭdaca, raportante ne nur pri kongresaj laborkunsidoj, sed sursceniĝante ankaŭ kiel fakulo pri artaj aranĝoj. Sed lia kritiko estas

---

[18] Ivo Lapenna, *Conceptions soviétiques de droit international public*, Paris: A. Pedone, 1954.

[19] Letero de Hans Jakob al Paul Kempeneers kaj Arthur Oliver, 15-9-1954; laŭ Ziko van Dijk, *Historio de UEA*, Partizánske: Espero, 2012, p. 206.

[20] I.L., „La tridekunua", *La Suda Stelo* 8. 1939, p. 83.

komprenebla pro la zorgo pri la impreso, kiun esperantistoj faris en la publiko. En la jam menciita unua postmilita UK en Bern (1947), kie Lapenna polarizis per politika radikaleco, li atente observis ankaŭ la konduton de ordinaraj samideanoj. Li konstatis, ke tie abundas stranguloj:

> Unu virino kun verdaj ŝtrumpoj klarigadis al mi, ke ĉiu esperantistino devus propagandcele porti nur verdajn ŝtrumpojn. Kelkaj havis blankajn ĉapojn kun grandega verda stelo. Unu venis al la balo en vesto, simile al nokta ĉemizo, kun amaso da verdaj stelegoj, steloj kaj steletoj. Mi vidis kriantan verdan kravaton kun enteksita ankoraŭ pli krianta verda stelo.[21]

Krome, Lapenna kritikis, ke la kongresa programo inkluzivis „fakkunsidojn“ eĉ de spiritistoj kaj ne malpli ol dektri diservojn.

Lapenna senlace pledis, ke la esperantistoj en informado pri Esperanto demonstru seriozecon. Kiel unu rezulto, en 1956 dum konferenco en sveda urbeto estis akceptita t.n. Principaro de Frostavallen, kiu eksplicite admonis la esperantistojn bridi sian entuziasmon kaj, ekzemple, ne ekscese dismontri la verdan stelon.

Se Montevideo kaj Frostavallen atestis la strebon de Lapenna transformi UEA en efikan organizaĵon de „batalanta movado“, li neniam malzorgis la emocian flankon, kiu ankaŭ ĉiam gravas en movadoj kun idealisma celado. La festparoladoj, kiujn li tra jardekoj faris en la inaŭguro de UK aŭ je aliaj okazoj, havis stimulan, korvarmigan efikon, kiun la aŭskultantoj apenaŭ kapablis rezisti. Ili helpis konstrui lian altan prestigon en la Esperanto-movado.

Je tiu ĉi punkto ni denove rigardu al la persona fono de Lapenna. Kiel dirite, li neniam revenis al Jugoslavio. Ŝajnas, ke en 1973 li konsideris veni al la UK en Beograd, sed devis rezigni, post kiam la jugoslaviaj aŭtoritatoj signalis, ke li estos plene ignorata. Pri sia forlasita hejmlando li malmulte parolis publike. Marianne Vermaas, dum multaj jaroj direktorino de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, skribis, ke Lapenna longe havis internan lukton ĉu “lasi parencojn, amikojn, karieron, landon kaj ĉion karan al li” kaj kun “sanganta koro […] fine decidis ne reiri” al Jugoslavio.[22] Ne estas dubo, ke ankaŭ poste Lapenna ofte sopiris je Dalmatio kaj Kroatio. Lia bofratino Eva memoris pri komunaj vojaĝoj kun Ivo Lapenna en Italio kaj Aŭstrio en la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj:

> Gino havis denaskan senton por humuro kaj dum tiuj tagoj li el la memoro elprenadis multajn humurajn okazaĵojn el la pasinto, lige kun malnovaj konatoj kaj eĉ lige kun malnovaj servistinoj. Verŝajne ĉio ĉi ege altiris lin, ĉar li havis (eble subkonscian) deziron reveni, almenaŭ dum tiuj momentoj, al tiu mirinda, belega tempo. Li tre amis sian regionon, kaj nur nun estas klare al mi, kiom li suferis [...].[23]

Mi bone memoras paroladon, kiun Lapenna fine de 1968 faris en internacia junulara seminario en Kolonjo. Lia temo estis “La intelektularo en orienta Eŭropo, en Francio kaj en Britio”.[24] En tiu prelego li kontrastigis la deziregon de homoj en sia iama hejmlando vaste kleriĝi kun la ekstrema specialiĝemo, kiun li observis inter anglaj universitatanoj, kaj la viglan komunikiĝemon de kroatoj kun la sperto, ke en Londono trajn-pasaĝeroj apenaŭ konversacias unu kun la alia, eĉ se ili dum jaroj en la trajno ĉiumatene apudsidas unu la alian. (Nur

---

[21] Ivo Lapenna, „Je pripensado kaj prijuĝo de la tutmonda demokrata esperantistaro!“ *Internacia Kulturo* 2. 1947, n-ro 13/14, p. 4. – Tiun ĉi karakterizan citaĵon uzas ankaŭ Peter G. Forster, *The Esperanto movement,* The Hague k.a.: Mouton, 1982, p. 233–234.

[22] Marianne Vermaas, „Amikeco kaj laboro“, en: Carlo Minnaja, red., *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, Kopenhago: Kehlet, 2001, p. 161.

[23] Letero de Eva Lapenna, Zadar, al d-ro Ivo Borovečki, 26-6-1996; citita en persona komuniko de Borovečki, 8-7-1996. – Gino (aŭ Ĝino) estas karesformo de Ivo.

[24] Aŭdebla ĉe http://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Ivo_Lapenna_at_Internacia_Seminario_in_1968

portempe ekzistis "Klubo de personoj emantaj paroli en la trajno".) En Zagreb, li krome rakontis, estas neimageble, ke homoj, vizitinte koncerton kaj teatron, ne tuj interŝanĝu siajn impresojn pri la aŭdita aŭ vidita en unu el la multaj proksimaj kafejoj. Li ne povis kompreni, ke en Anglio apenaŭ troviĝas kafejoj; la homoj anstataŭe iras al *pub* (sed ne por trinki kafon). Kapskue li rimarkis, ke en lia kolegio preskaŭ neniu ludis muzik-instrumenton. (Li mem estis aktiva violonĉelisto.)

Lapenna fascinis la junajn aŭskultantojn en Kolonjo per sia prezento de la antaŭmilita intelektularo en orienta Eŭropo. Li menciis, ke la jugoslavia polico ("plej stulta en la mondo") stampis komunista preskaŭ ĉiun inteligentulon, kun la sekvo, ke des pli da oponemaj homoj estis altiritaj al la komunisma movado. Malgaje li rakontis, ke kontraŭe en Anglio "intelektulo" estas preskaŭ ofenda esprimo. Kvankam ni havas pri Lapenna ĉarman priskribon, kiu komparas lian konduton en kunsido kun tiu de „enuanta angla lordo"[25], mi verŝajne ne troigas supozante, ke Lapenna ĉiam sentis sin fremda en Anglio. La lingvon li lernis ĝis kontentiga nivelo, sed neniam li povis en ĝi tiagrade disvolvi sian oratoran talenton kiel en la kroata kaj en Esperanto. Nur de tempo al tempo li permesis al si la esprimon de bedaŭro pro sia vivo en ekzilo. Fojfoje li asertis, ke li havis ŝancon estri lernejon por diplomatoj, se li estus restinta en Jugoslavio, kaj mi memoras, ke ne unu fojon li kun nur iom subpremita fiero asertis, ke, se li ne estus foririnta, li eble "nun" estus justic-ministro de Jugoslavio.

La vivo de Lapenna pasis alie. Lia pli juna samideano, Ivo Borovečki, kiu en 1950 transprenis de Lapenna la prezidantecon en Jugoslavia Esperanto-Federacio, resumis (en 1999) tiun vivon, parolante pri tio, ke Lapenna evoluis de "juna marksista juristo al mondfama antikomunista jura fakulo".[26] Kiel tio speguliĝis en UEA? Oni povus nun moki pri la determinismo de Lapenna, kiu plurfoje, kun sia oratora temperamento, variigis la tezon, ke la monda lingvo-problemo de tago al tago akriĝas tiom, ke la solvo – la ĝenerala alpreno de Esperanto – estas neevitebla. Ankaŭ ne eblas kaŝi, ke, kiam io ne okazis laŭ la antaŭvidoj aŭ laŭ la volo de Lapenna, li reagis netolereme kaj kapablis verŝi super siajn kunagantojn en la Esperanto-movado koleron en timige granda kvanto. Tio estis precipe rimarkebla post 1974, kiam li demetis ĉiujn funkciojn en UEA, konstatinte ke li ne havas ŝancon esti reelektita kiel prezidanto, kaj tuj lanĉis bruan kampanjon, kies ĉefa trajto estis la aserto, ke forigis lin kliko de orienteŭropaj komunistoj kaj okcidentaj "kunvojaĝantoj". Al siaj verkoj li aldonis unu, kiun ni eble plej trafe apartenigus al la kategorio de krimromanoj.[27] Estas paradokse kaj tragedie, ke en sia polemikado kontraŭ la novaj gvidantoj de UEA li uzis simile absurdajn kulpigojn, kiel estis tiuj, kiujn kontraŭ li dudek jarojn antaŭe uzis usonaj kontraŭkomunistaj esperantistoj. Kvankam surprize malmultaj aŭskultis lin aŭ eĉ pretis plue sekvi la pli frue preskaŭ adoratan prezidanton, Lapenna daŭrigis la kampanjon ĝis sia morto en decembro 1987. Liaj sekvantoj nur kvar jarojn poste fine ĉesis paroli pri "hamburga puĉo".[28] Je la unua provo objektive analizi la cirkonstancojn[29], kiuj kondukis al la falo de Lapenna, ili reagis per silento.[30]

---

[25] Eugène de Zilah, "Mia unua renkontiĝo kun Ivo Lapenna", *La Gazeto* 10. 1995, n-ro 59, p. 15.

[26] Ivo Borovečki, „Memore al d-ro Ivo Lapenna", *Tempo* (Zagreb) 17. 1999, n-ro 3/4, p. 4.

[27] *Hamburgo en retrospektivo. Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA*, dua eldono, Kopenhago: Horizonto, 1977.

[28] La fina kampanjero eble estas Jens S. Larsen, „La heredo de Lapenna", *La Gazeto* 7. 1991/92, n-ro 37, p. 15–23.

[29] Pli detale pri tio vd. *Utila Estas Aliĝo*, p. 97–108.

[30] La sola escepto supozeble estas noto en *La Gazeto* 24. 2009, n-ro 140, p. 31.

Kio estas eble plej bedaŭrinda, estas la fakto, ke tiu kampanjo minacis forgesigi ne nur la meritojn de Lapenna, sed ankaŭ obskurigi la seriozan ligitecon, kiu nekontesteble ekzistis inter Esperanto kaj la ĝenerala strebado al pli bona mondo, kia ĝin ekzemple reprezentis la socialisma ideo. Vidigi tiun ligitecon en UEA neniam estis facile. Malhelpis aŭ la tradicio de la Bulonja Deklaracio, laŭ kiu la lingvo estas uzebla por kiu ajn celo, aŭ la danĝero, ke la idealismon eluzos anoj de diversaj ismoj. Lapenna bone komprenis la limigan efikon de la principo de neŭtraleco. Li konsciis, ke la simpla prudento ofte devigis al kompromiso. Aliflanke, li abomenis pasivan neŭtralecon aŭ senpensan letargion. Tial li en siaj paroladoj kaj sennombraj artikoloj atentigis, ke Esperanto estas ligita kun "humanisma internaciismo".[31] Samtempe li atentis, ke UEA ne troe konkretiĝu. Tion li opiniis necesa por ne forpuŝi unu el la partioj en la Malvarma Milito kaj por gardi la agliberecon de la esperantistoj en Soveta Unio.[32] Tendencojn en TEJO, la junulara sekcio de UEA, trakti politikajn temojn pli kuraĝe kaj interpreti la neŭtralecon pli larĝe li malŝatis, kio certe ludis rolon en la antaŭhamburga manovrado. Sed mi ne tute aliĝas al la opinio, ke "Lapenna emis eviti eĉ la plej etan ŝajnon de protestopolitiko"[33], ĉar la memoro pri lia propra junaĝa ribelemo ofte nutris komprenon por TEJO.[34] Ĝuste en 1968 li eĉ riproĉis al ĝi mankon de dinamismo kaj plende konstatis, ke en la gazetaro de la ribelema junularo nenio aperas pri Esperanto.[35] Li ĝoje notis, ke la revuo *Kontakto* en 1974, do en la hamburga jaro, elfosis lian antaŭmilitan batalon kontraŭ neŭtralismo.[36]

La eksa junkomunisto tamen ne ŝatis, ke en la 1970-aj jaroj fervoruloj en kaj ekster TEJO puŝu la Esperanto-movadon en la proksimecon de komunistoj, kiuj volis ekspluati la protestan movadon, sen mem kompromise modifi sian pozicion. Gravis por li, kiel dirite, aglibereco. Sian personan vidpunkton Lapenna klopodis teni netuŝata de pragmataj konsideroj. Alivorte, li ne kaŝis sian opinion. Je multaj okazoj li akcentis la gravecon de homaj rajtoj. Dume pri pacbatalo, kiu tiel ofte rolis prioritate en deklaroj el orienta Eŭropo, li parolis malmulte aŭ ne emfaze. En la kongresaj inaŭguroj li ne ĝeniĝis akuzi la ŝtatojn, ke en sia propagando por paca kunekzistado ili neglektas la homan flankon, nome la neceson zorgi pri ne nur paco inter ŝtatoj, sed ankaŭ pri libera interkontaktado de ordinaraj homoj trans landlimojn.[37] Ne necesis, ke Lapenna pli rekte aludu al Fera Kurteno por komprenigi, kion li celis diri.

La persona opinio de Lapenna do estis bone konata. Fine de 1968, dum la menciita junulara seminario, li ĝoje rakontis, ke polaj studentoj dum unuamaja manifestacio en Varsovio spontanee, laŭte vokis la sloganon "Socialismo! Demokratio!". (Temis pri sperto dum profesia vojago al Pollando en 1966.) En ligo kun tio, estas atentinde, ke la gvidaj orienteŭropaj esperantistoj dum multaj jaroj akceptis Lapenna, eĉ se nur grumble, en la plej alta pozicio de UEA – ili ne povis ne scii, ke Lapenna en la fama London School of Economics esploris kaj instruis pri juraj demandoj en orienta Eŭropo. Fakte, por Moskvo kaj ĝiaj subtenantoj la sinteno de Lapenna estis tre ĝena, ĉar li kritikis la evoluon en Soveta Unio kaj Jugoslavio ne de ia dekstra pozicio, sed surbaze de komparoj, nome mezurante la realecon laŭ la marksismaj teorioj. Tio estis por la partiaj reprezentantoj multe pli malagrabla ol kruda antikomunismo. Lapenna ekzemple memorigis, ke la tezo pri formorto de la ŝtato post

---

[31] Ivo Lapenna, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, Rotterdam 1966, p. 63 k.sekv.

[32] Kvankam la estraro elektita en Hamburgo daŭrigis ĝuste tiun linion, Lapenna de tiam forte kritikis ĝin.

[33] Humphrey Tonkin, „'Generale parolante'. Lapenna kiel gvidanto kaj oponanto", *Beletra Almanako* 4. 2010, n-ro 8 (junio), p. 111.

[34] Laŭ Carlo Minnaja, Lapenna „rigardis [TEJOn] kun amo kaj ofte defendis ĝin" kontraŭ malpli komprenemaj estraranoj: "Miaj kontaktoj kun Ivo Lapenna (1)", *Literatura Foiro* 40. 2009, n-ro 242, p. 305.

[35] Vd. supre noton 24.

[36] U. Lins, "La juna Lapenna", *Kontakto* 11. 1974, n-ro 1, p. 15‒17. – Kp. Ziko van Dijk, *Historio de UEA*, p. 279.

[37] Lapenna, *Elektitaj paroladoj*, p. 66.

sukcesa socia revolucio iam apartenis al la plej allogaj eroj de marksismo, precipe por studentoj kaj la progresema intelektularo, konsistigante "veran motoron de revolucio". Kiom pli seniluziige, laŭ Lapenna, estis, ke post la Oktobra Revolucio tiu sopiro ne realiĝis. Anstataŭ morti, la "ŝtata aparato iĝis pli potenca kaj la subpremo de la sekreta polico pli sufoka ol iam antaŭe".[38]

Lapenna ne simplige turnis sin kontraŭ stalinismo, ŝovante la kulpon al "misuzantoj" de marksismo-leninismo. Kontraŭe, la enkondukon de teroro por disciplini la popolon li atribuis rekte al Lenin.[39] Tion eĉ multaj maldekstruloj en okcidento tiutempe emis ignori. Traktante la aktualan politikon, Lapenna substrekis, ke Soveta Unio por siaj ekspansiaj celoj senĝene uzas jen la koncepton de socialista internaciismo por pravigi sian superregon en la propra bloko, jen tiun de paca kunekzistado, kiu ebligas la enmiksiĝon en la enlandajn aferojn de ĉiu alia ŝtato.[40]

Lapenna ankaŭ faris komparojn inter la sistemoj en Soveta Unio kaj Jugoslavio, kiuj ambaŭ baziĝas sur "falsado de marksismo". La lasta aperis, ne mirige, en iom malpli nefavora lumo. Sed li ne preterlasis montri al la problemoj de la multnacia lando, aparte kritikante, ke la popoloj de Jugoslavio neniam povis libere voĉdoni pri tio, ĉu ili deziras kunvivi kaj, se jes, en kia unio. Tion li skribis en eseo, per kiu en 1982 li kontribuis al kroatlingva libro kun anglalingvaj resumoj, *Demokratske reforme*.[41] La eseo aperas tie kune kun artikoloj de la famaj „disidentoj" Milovan Djilas kaj Mihajlo Mihajlov.

La artikolojn de Lapenna en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj ni nun legas kun la scio, kio okazis poste. Li ekzemple verkis pri la signifo de la Fina Akto de Helsinki, pri kies pledo por libera interŝanĝo de opinioj ni intertempe scias, kiom ĝi helpis subfosi la sovetian sistemon kaj fakte kontribuis al ĝia disfalo. Tian evoluon Lapenna kompreneble ne povis antaŭvidi. En la kolonja seminario fine de 1968 li diris, ke en Soveta Unio (kiun li vizitis en la antaŭa jaro) neniu pensas pri la restarigo de kapitalismo. En siaj verkoj li tamen tre proksimiĝis al la prognozo, ke la "reala socialismo" kolapsos. En analizo de la nova partia programo de la sovetia KP li venis al konkludo, kiu estis ĝenerale pesimisma. Sed al sia fina demando "Ĉu estas iuj esperoj por la estonteco?" li donis pozitivan respondon, esprimante la supozon, ke "la pliboniĝintaj vivkondiĉoj kaj nova kleriĝo necese devas generi pli liberalajn fortojn"[42]. Lapenna skribis tion en 1962, do proksimume dudekkvin jarojn, antaŭ ol Miĥail Gorbaĉov proklamis sian politikon de "rekonstruo" de Soveta Unio.

Plenumiĝis grandparte la atendo de Lapenna, ke la komunisma sistemo suferos pro siaj internaj kontraŭdiroj kaj ke en la procezo kondukanta al ŝanĝo intelektuloj ludos gravan rolon. En tiu senco Lapenna neniam perdis esperojn, kiujn li akiris en sia studenta epoko, precipe la sopiron je nova soci-ordo kaj nova mond-ordo. Fakte, per tiu ĉi provo kompreni la vivo-vojon

---

[38] Ivo Lapenna, *State and Law: Soviet and Yugoslav Theory*, London: Athlone Press, 1964, p. 118–119. – Vd. la komentojn de lia kolego William E. Butler dum rememoriga kunveno post lia forpaso, en: *Memore al prof. d-ro Ivo Lapenna*, dua eldono, Kopenhago: Peter Zacho, 1988, p. 44.

[39] Ivo Lapenna, „Lenin, Law and Legality", en: Leonard Schapiro kaj Peter Reddaway, ed., *Lenin, the Man, the Theorist, the Leader: A Reappraisal*, London: Pall Mall Press, 1967, p. 256.

[40] Ivo Lapenna, „The Soviet Concept of ‚Socialist' International Law", *The Year Book of World Affairs* 29. 1975, p. 242–264; vd. ankaŭ *Horizonto* 10. 1985, p. 107.

[41] Ivo Lapenna, „Sovereignty and Federalism in the Jugoslav Constitution", en: Vane Ivanović, *Demokratske reforme*, London: Demokratske reforme, 1982, p. 127–130.

[42] Ivo Lapenna, „Party and State in the Programme", en: Leonard Schapiro, ed., *The USSR and the Future: An Analysis of the New Programme of the Communist Party of the Soviet Union*, München: Institut zur Erforschung der UdSSR, 1962, p. 160.

de Lapenna mi deziras kontribui al la temo “socialismo kaj Esperanto”.[43] Estas bone konate, ke ekde la komenco de la pasinta jarcento ĉiam troviĝis homoj, kiuj aliĝis al socialismo/komunismo kaj lernis Esperanton – en kiu sinsekvo, tio tie ĉi ne gravas. Ja al multaj ŝajnis nature uzi internacian lingvon en movado, kiu vokis al la tutmonda emancipo de laboristoj. Ne estis tamen facile konservi tiun ligon, ĉar inter la gvidantoj de la laborista movado la simpatio al Esperanto ne estis pli granda ol en la ĝenerala socio, aŭ ili eĉ iom suspekteme rilatis al esperantistoj, kiuj ŝajnis lingve anticipi ion, kio maksimume estis rezervota por la tempo post sukcesa monda revolucio. Ankaŭ estas observeble, ke multaj komunistaj esperantistoj senreviĝis – foje pri komunismo, foje pri la ŝancoj de Esperanto, foje pri ambaŭ – kaj malfideliĝis al la du idealoj aŭ al unu el ili. Lapenna, kiu seniluziiĝis pri komunismo tiagrade, ke li por ĉiam forlasis Jugoslavion, laŭ mi apartenas al la kategorio de tiuj, el kies junaĝaj revoj konserviĝis unuavice Esperanto.

Certe, en la vivo de Lapenna la fideleco al Esperanto estis la plej longdaŭra kaj plej okulfrapa elemento. Sed la kuna ligiĝo al komunismo kaj Esperanto, kiun alpropriĝis al si Lapenna en la tridekaj jaroj kaj dum la milito, restis heredaĵo pluefikanta. Unu aspekto de tiu heredaĵo estas la strebo al kleriĝo, la eduko al nedogma pensado. Tio ĉi siatempe motivis Lapenna lerni Esperanton kaj aliĝi al la Komunista Partio kaj ne ĉesis inspiri lin, ankaŭ post kiam malfortiĝis la ligo inter ambaŭ lojalecoj. La efiko montriĝis kaj en lia profesia laboro kiel universitatano kaj en lia multjara agado por UEA. Tial, se oni demandas pri celo apud Esperanto, kiu ĉe Lapenna konsistigas kontinuecon tra la jardekoj, mi respondus: la demokrateco. Pri ĝi li skribis junaĝe en *La Suda Stelo*[44], li ĝin multokaze proklamis dum sia gvidado de UEA, kaj ĝis la fino li ne malesperis, ke la iam prirevata socialismo estos revivigita kun la helpo de demokrati-aspiraj homoj. Pro tio li ne ĉesis varbi por la subteno de ribelemaj gejunuloj; tion ni rimarkis en Kolonjo, kaj tio eĉ sentiĝis ĝis preskaŭ unu jaro antaŭ la Hamburga UK.[45]

Samtempe necesas atenti, ke efikis ankaŭ alia heredaĵo. Temas pri karakterizaĵoj, kiujn Lapenna eble parte havis dekomence, kies evoluon li tamen dankis, kiel foje rimarkis Juan Régulo, ankaŭ al marksisma influo kaj al trejnado en la komunista partio.[46] Temas pri lia emo ĉiam pravi, lia malpacienco kaj necedemo, lia ekstreme distanc-krea gvidstilo: la rezultan konduton de Lapenna devis elteni liaj kunlaborantoj en la Esperanto-movado. En 1986/87, kiam jam rimarkeblis la novstila politiko de Gorbaĉov, Lapenna ankoraŭ asertis, ke la okazonta Jubilea UK en Varsovio “multe kontribuos al fortikigo de la *sovetiisma diktaturo de Jaruzelski* kaj estas insulto [...] al la memoro de Zamenhof”[47], kaj li tiam polemikis eĉ kontraŭ unu el siaj lastaj apogantoj, Juan Régulo Pérez, pro tio ke tiu atentigis, ke en Hamburgo la eksigon de Lapenna “aktive kunhelpis tre seriozaj kaj sinceraj kontraŭsovetiismaj komitatanoj de UEA”.[48]

Kial la klarvido, kiun esprimis Lapenna en 1962 pri la vivoŝancoj de Soveta Unio, ne esprimiĝis en la Esperanto-movado, plej evidente post Hamburgo? Kial la elstara esperantisto Lapenna tiom diferenciĝis de la specialisto pri internacia juro? La enigmo restas ankaŭ pli ol dudekkvin jarojn post lia forpaso. Estas kvazaŭ du personecoj. Jen la homo, kiu frue antaŭvidis la disfalon de la sovetia reĝimo, kiu impresis la esperantistojn per sia laborkapablo

---

[43] Vd. mian artikolon “Ruĝ-verda malakordo. Observoj pri komunistaj esperantistoj“, en: Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, red., *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*, Rotterdam: UEA, 2010, p. 443–461.

[44] Vd. lian ĉefartikolon en *La Suda Stelo*, aprilo 1937 (kp. supre noton 12).

[45] Vd. *Utila Estas Aliĝo*, p. 98.

[46] Pri tio kp. la nekrologajn rimarkojn de Régulo, laŭ *Utila Estas Aliĝo*, p. 111.

[47] *Horizonto* 11. 1986, p. 105.

[48] Letero de Régulo, *La Gazeto* 2. 1987, n-ro 9, p. 9; simile, Régulo en n-ro 12, p. 9. – El la movadaj gravuloj krom Régulo nur Gaston Waringhien kaj Paul Neergaard subtenis Lapenna post Hamburgo.

kaj per siaj mobilizaj paroladoj – kaj jen la alia Lapenna: la heredaĵo de ideologia sindediĉo, kiu tute mankas en liaj (angla- kaj franclingvaj) verkoj, konserviĝis ĉe li kadre de la Esperanto-movado, kiel montras lia obstino en Bern, la favora juĝo pri la hereza lingvisto Nikolaj Marr[49], la fantaziado pri puĉo kaj lia insistado, ke UEA estas influata de Moskvo. La du flankoj de Lapenna eble ĉiam kunekzistis, kun portempa variado de la pezoforto. En sia fako li estis sobra analizisto, sed ekster ĝi, precipe en "Esperantujo", li emis disvolvi sian alian flankon, tiun de ideologo, de homo, kiu havis profunde ankritan kredaron: unue pri komunismo kun Esperanto kiel konsistiga ero, poste nur pri Esperanto (plus la interna ideo).

La neskuebla konvinko de Lapenna ofte helpis, ĉar ĝi inspiris kaj mobilizis la esperantistojn. Sed, precipe je la fino de lia vivo, la kredaro iĝis dogmo, de kiu li ne plu povis liberigi sin.

[49] Por pli da detaloj vd. Sébastien Moret, „Marr, Staline et les espérantistes", *Cahiers de l'ILSL*, n-ro 20, 2005, p. 199–214.